

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Per tiu elsendo ni finas serion de kvar prelegoj dediĉitaj al la kimbanguismo. Pasintan semajnon ni konstatis, ke tiu kongolanda nigrula eklezio kapablis sin originale organizi.

A.- Tiu kolektiveco, kiu grupigas pli ol unu milionon da personoj en dinamisma societo, konstruis mem centojn da lernejoj, starigis originalan instru-sistemon kaj estas medio preta por fruktodona teknika helpo.

Cl.- La plej favora elemento, kiu fruktigus tiun teknikan helpon, tio estas sendube la plena afrikaniĝo de tiu eklezio. De sia fondiĝo ĝi estis gvidata de afrikanoj. La persekutoj, fare de la misioj kaj koloniisma reĝimo kaj poste eĉ de la sendependiĝinta ŝtato, forĝis karaktere altnivelan eliton. Tiuj homoj sciis, ke ili ne povos kalkuli je la helpo de la ceteruloj, ili do ĉion mem entreprenis kaj mem planadis siajn agadojn.

A.- Ricevante nenian subvencion ili estis absolute liberaj en siaj elektoj. De la okcidenta civilizo ili adoptis la plej bonajn alportojn, forjetante la malbonojn. Ili konservis sian afrikan originalecon.

Cl.- Ekzemple la kimbanguanoj estas organizataj laŭ la patriarka modelo de la malnova afrika societo. La estroj estas potencaj, la hierarkio estas bone strukturita, la manko de individuismo favoras grandan disponeblecon ĉe la fidelularo.

A.- Sub la persekutado tiu eklezio ne povis esperi je ekstera subteno. Pro tio ĝi devis konstante reinvesti siajn monrimedojn kaj profitigi la plej grandan nombron de la konoj de sia elito.

Cl.- Imagu teknikan helpon en tiu medio. Ĝi rapide profitus al la tuto. Kaj François Choffat, legante la raportojn de la funkciuloj de tiu kimbangua eklezio, rimarkis, ke tiuj homoj bone konas siajn limigojn, ĉu materiajn, ĉu teknikajn aŭ kulturajn. Ili ankaŭ konas la plej gravajn bezonojn de sia lando Kongio. Pro tio iliaj streĉoj ĉefe iras al la instruado, formado de la junularo, virina promocio, agrokulturo, bredado kaj intertriba reamikiĝo.

A.- Tiu matureco pruvas, ke en Kongolando la teknika helpo ricevenda devas ĉefe favori progresigon de la entreprenita laboro. Al malriĉaj komunumoj bonvolo ne sufiĉas por starigi superan instruadon kaj modernigi la metiajn strukturojn.

Cl.- En tiu celo devas labori la teknika helpado. Dum en Nordafriko ĉio estas kvazaŭ ankoraŭ farenda en la kamparanaj regionoj, la mankoj en Kongolando estas pli teknikaj.

A.- Ni ekzamenu la ĉefajn mankojn cititajn en la raportoj de la kimbanguaj oficistoj.

Cl.- Unue ekzistas lingva manko. En Kongolando kunvivadas pli malpli bone multaj triboj. Ĉiu posedas propran lingvon. Neniu triba lingvo povas ofici kiel oficiala tutnacia lingvo sen provoki ribeladon de la aliaj tribanoj. Hindio konas similan situacion. Ĝi solvis ĝin provizore per adopto de la angla lingvo. Kongolando adoptis la francan. Tio ne signifas, ke aŭtomate ĉiuj kongolandanoj kapablas majstri la lingvon. Profesoroj de la franca lingvo estas serĉataj, ĉefe en la duagrada instruado, kiu estas donata nur en la franca kaj por la formado de la instruistaro, kiu devas poste disvastigi la uzon de la franca ĝis la ekstremojn de la nacio.

A.- Tion aŭdante la esperantistoj bedaŭros la neuzon de sia internacia lingvo. Ni pensas, ke nacia lingvo ne estas vera solvo al la lingva problemo de intertriba federacio. Ĝi helpas nur la eliton intelektan. Nur facila interlingvo kiel esperanto povos favori la popolajn intertribajn

Kimbanguismo, 4-a parto
Claude Gacond, 139-a radioprelego, 1966.06.01 & 1966.06.04

rilatojn. Sed se nun esperanto sin ne trudas kiel pontlingvon, tio estas, ke Kongolando, kiel Hindio, bezonas la servon de granda eŭropa kultur-lingvo.

Cl.- Esperantistoj devas direkti siajn streĉojn al la eldonado de lernolibroj, kaj ĉefe de lernolibroj por la metiistoj, simplaj homoj, kiuj ĝenerale ne havas sufiĉan konon de la franca aŭ angla por povi reale profiti pri la francaj kaj anglaj metiaj lernolibroj. Jen bela laboro por la Muelejoj de la metilernantoj, movado internacia, kies centro troviĝas en Francio. Ni revenos al tiu temo.

A.- La raportoj pri la kimbanguanoj konstatas, ke ekzistas ofte kapablaj metiistoj povantaj instrui siajn konojn al la junularo. Kio bedaŭrinde ĉefe mankas, tio estas la iloj kaj maŝinoj ebligantaj tiun instruadon. Ekipado de metilernejo treege kostas kaj superas la ekonomiajn fortojn de la komunumoj en subevoluinta lando. Jam en niaj eŭropaj landoj la ekipado de tiuj lernejoj ŝajnas ofte granda financa oferado.

Cl.- Preskaŭ ĉiuj virinaj profesioj povas efiki en la teknika helpo. Oni devas formi monitorinojn pri infankulturo, pri higieno, pri mastrumado, pri socia asistado. Jen belaj taskoj por junaj eŭropaninoj, kiuj dum kelkaj jaroj dezirus helpi siajn afrikajn fratinojn.

A.- La kamparaninoj povus diskonigi en la kamparajn mediojn la modernajn metodojn pri brut- kaj plant-selektado. Tajpistino kaj oficistino povus instrui siajn konojn al inteligentaj knabinoj forlasantaj la lernejon.

Cl.- Ni povus fari ankoraŭ longegan liston de la helpoj, kiuj estas atendataj. La hodiaŭa junularo en la riĉaj landoj troviĝas antaŭ mirinda epoko. Post la akirado de diplomo ĝi povas entrepreni novstilan metiveturadon. Ĝi povas iri diskonigi siajn sciojn en la plej diversajn teritoriojn kaj helpi malpli privilegiatajn labor-kamaradojn.

A.- Povu kelkaj el ili oferi siajn servojn al la kimbanguanoj en Kongolando.

Cl.- Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-